

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Köln Horrem, Rejnlando,
Germanio.
Poŝteka konto Köln 70865,
por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur
sur unu flanko de l' papero.
Skribu ĉion legeble, se eble
per maŝino. Por resendado aŭ
respondo aldonu resp.-kup.
aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al
s-o Teo Jung, Köln-Horrem,
Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazeto-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala jetero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne Esperantistaj), povas ricevi ET por propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7 50 gvidenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 litroj, 60 finaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1200 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj por kiom valoras la pago. Abonantoj kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15 Nachtrag, Ergänzungsheft 3. paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.— mk.).

JARABONO
Aperas semajne.
kostas po cm² (kvadratemetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/12 jarabono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadratemetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/12 jarabono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 69 :: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :: 29. Jan. 1922.

XV-a Universala Esperanto Kongreso 1923 en Italio?

En Praha la delegito de la japanaj samideanoj, s-o Narita, invitis la XV-an Universalan Kongreson por 1923 al Tokio, kaj la kongresanaro ĝoje aplaudis lian inviton. Tamen oni rajtas supozi, ke tiu aplaŭdo ne estis konspekvenco de seniluzia, reala meditado, sed ke ĝi elŝprucis el momenta, entuziasma simpatio por la orientaj amikoj.

La redakcio de ET ankaŭ jam ricevis artikolojn, kiuj avertas aranĝi nuntempe tutmondan Esp. kongreson en Japanlando, kaj japanaj samideano informis nin, ke la lasta kongreso de japanaj Esperantistoj ne aprobis la inviton — ni ne scias, ĉu tiu neaprobo fakte okazis, sed, se ĝi estus fakto, ĝi pruvus, ke la japanaj samideanoj ne havas iluziojn pri la malfacilaĵoj, kiujn prezentus la okazigo de tia kongreso por la aranĝantoj kaj por la partoprenantoj. Ni ne volas paroli pri la malfacilaĵoj de tiel longa vojaĝo, ni nur volas atentigi pri unu fakto: malbonvalutuloj tute ne povus partopreni ĝin, ĉar la vojaĝo al Japanlando kostus (laŭ nuntempaj cirkonstancoj) por ĉeĥoslovakoj aŭ finnoj ĉ. 100 000 kr. resp. mk., por germanoj pli ol kvaronan milionon da markoj, por poloj kvin milionojn da markoj, por aŭstroj eble dek milionojn da kronoj (10 000 000!). Jen malfacilaĵoj, pri kiuj la kongresanoj en Praha certe ne konsciis, aplaudante la inviton al Tokio. Oni ja ne bezonas tute malakcepti la proponon pri internacia kongreso en Japanlando; sed nuntempe estus nur eble kaj konsilinde aranĝi tie Tutpacifikan Esperanto-Kongreson, kiun povus partopreni, krom japanoj, samideanoj el Siberio, Ĉinlando, Aŭstralio, Oceanio kaj Ameriko.

Ĉiukaze, dum la fokuso de la Esp. movado troviĝas en Eŭropo, estos ĉiam konsilinde aranĝi la **Universalan Esperanto-Kongreson**, la **Mondfeston de la Esperantistaro**, en tiu kontinento.

Tial ni sincere ĝojis legante pri la intenco de Emilia Esp. Asocio inviti la XV-an Universalan Kongreson al Bologna



Funebra Procesio de Antoni Grabowski.
Fotografis: W. Miernicki, Warszawa.

Ĝis nun ne jam okazis Universala Esp. Kongreso en Italio. Kaj ĝuste en Italio nia movado lastatempe bone progresas, ĝuste Italio, t. e. nia movado en Italio, povos tiri grandan utilon el Universala Kongreso, ĝuste Italio estas lando tiom interesa pro sia historio, pro siaj multenombraj kulturaj monumentoj, pro siaj mondfamaj naturbelajoj, ke ĝi certe allogos multege da samideanoj.

Cetero estas bonega ideo, post la Mondfestoj en alta Nordo, en la lando de dekmil lagol, okazigi ĝin en varma Sudo, en la lando de Suno kaj eterna Printempo. Ĝuste tiu kontrasto estos bonefika, alloga, ĉarma.

Poste eble kongreso sur la Balkano estus konsilinda: en Konstantinopolo aŭ Sofio, kaj post

ĝi eble denove kongreso en Meza Eŭropo. Ni ja devas aranĝi niajn Mondfestojn tial, ke ili alitros kiel eble plej multe da samideanoj al grandioza manifesto por nia altcela ideo, kaj ke ili havu plejleble grandan efikon sur la neesperantistaj publikon, kaj ni devas ankaŭ konsideri, ke ni atingu per niaj Mondfestoj iom post iom, ĉiujn landojn kaj naciojn, precipe en Eŭropo kaj Ameriko, kaj poste ankaŭ en aliaj kontinentoj, se ni ne preferos aranĝi por la orientaj popoloj apartan Mondfeston ĉiujaran.

Ni tute salutas la intencon de la Italaj samideanoj kaj kredas, ke kun ni la plimulto de la Esperantistaro simpatie subtenos la ideon de kongreso en Italio.

lia gastiganto hieraŭ cedis al li sian propran liton. La piedoj de Mateo nun estis nudaj, do Nilov detiris liajn botojn, dum li estis dormanta. Verdire, li ne demetadis siajn botojn dum sia tuta feroja vojaĝo, kaj liaj piedoj estis kvazaŭ en fajro. Tamen tia zorgado kaŭzis al li nun iom da malplezuro. Li nun tute ne dubis, ke Nilov estas la juna sinjoro el Loziŝci, kaj ke la famoj do montriĝis pravaj: certe li forvendis la patran heredaĵon kaj nun travivas en fremdlando la sorton de erarinta filo. Sed ĉar Nilov nun faris por li grandan servon kaj estis sinjoro, Lozinski decidis tute ne malkaŝi al li, ke li lin ekkonis. Tamen en lia konduto kun Nilov ĉiam vidigis nevola respekto. Tio aldonis ian ĝenatecon, ian necertecon al liaj interrilatoj. Nilov kondutis kun Mateo senĝene sed sindeteneme, Mateo konfuziĝis kaj morale kuniĝis.

La sekvintan tagon, reveninte el la arboŝejo, Nilov diris al Mateo, ke, se li deziras, li povas ricevi laboron: portu lignajn tabulojn kaj trabojn el barkoj al riverbordo. Mateo sendube ĝoje konsentis. Kaj baldaŭ la antaŭnelonga famulo, viro, pri kiu parolis ĉiuj gazetoj de Ameriko, tute modeste laboris kun aliaj laboristoj, transportante lignan materialon. Lia forta kaj lerta maniero nuanumi pezajn kverklignajn trabojn ricevigis al li plialtigitan pagon, kaj du semajnojn poste li jam laboris kun Nilov, almetante tabulojn al la radoj, per kiuj Nilov preparadis maldikajn tabuletojn. Vespere ili ambaŭ, kovritaj per segaĵoj, revenadis hejmen.

Mateo luprenis ĉambron en la naibarajo de Nilov, ili kune tagmanĝis en restoracio. Mateo ne kontraŭparolis, sed al li ĉiam ŝajnis, ke tagmanĝi en restoracio estas vera frenezaĵo, kaj li decidis, ke post iom da tempo li arangoj sian vivon laŭ pli modesta maniero. Ricevinte la unuan pagon, li tre miris, ke spite ĉiujn elspezojn restas al li ankoraŭ sufiĉe da mono. Li ĝin ŝparis, aĉetinte nur tolaĵojn por si.

La vera stato de nia movado.

De Hans Sappl, ĉefsekr. de Ika, Graz (Aŭstrio).

Ĉar ET estas ĵurnalo tute sendependa kaj neŭtrala, ĉiu Esperantisto do rajtas tute malkaŝe diri sian opinion pri la nuntempa stato de nia movado. Permesu do, karaj kolegantoj, ke mi per kelkaj frazoj provu montri objektive al vi laŭ persone faritaj spertoj en diversaj landoj la veran staton de nia movado.

Estas fakto, ke ni Esperantistoj kelkfoje estas trompataj rilate al la sukcesoj de Esperanto. Kiu ekzemple atente kaj precize tralegas la diversajn Esperanto gazetojn ĉiulandajn kaj notas de tempo al tempo tute serioze kiel montriĝe — la progresojn atingitajn en la diversaj urboj kaj landoj, ofte opinias pro tio la Esperantian movadon bonega en la koncerna urbo aŭ lando. Sed li eraras, havante mem okazon por propraj okuloj vidi la purajn faktojn.

Antaŭ kelka tempo mi vojaĝis en fremdan landon por plenumi profesiajn aferojn, intencante kompreneble kiel Esperantisto uzi la servojn de UEA ktp. Antaŭe mi legis en la gazetoj pri bone organizita movado tie. Alveninte en la urbo, post longa serĉado mi trovis la delegiton de UEA (malgrandeta verda ŝteto anoncis, ke tie loĝas la regiona delegito). Mi petis lin havigi al mi malmultekostan loĝejon, kaj li respondis al mi tre afable; ke mi mem provu serĉi loĝejon en la urbo, li scias momente nenian taŭgan. Mi foriris, pensante, ke tiu delegito ne tute komprenis la taskon de sia ofico, kvankam li faris sufiĉe grandan bruon en la Esperantista gazetaro. Poste mi volis aĉeti kelkajn librojn Esperantistajn en la granda „tutlanda Esperanto-librejo“. Sed, ho ve, mi ne povis aĉeti, ĉar neniu el la vendistaro komprenis Esperanton. Salvis al mi, kvazaŭ oni scias neniom pri Esperanto. Mi foriris, kaj mia barometro multe falis, vidinte per propraj okuloj, ke oni ofte estas trompata.

Ankoraŭ post semajno Nilov diris al li, ke ili hodiaŭ tros Debltown-on, kie Nilov estas faronta paroladon. Ili venis en salonegon, plenplenan je publiko, kiu lin akceptis per aklamoj kaj fajfado (en Ameriko tio estas signo de favoro). Nun ĉio silentiĝis; la juĝisto Dickinson diris kelkajn vortojn, montrante jen Mateon, jen s-ron Nilov; poste tiu lasta longe kaj flue parolis, de tempo al tempo montrante ion sur granda geografia karto. La publiko, konsistanta plejparte el laboristoj, aŭskultis kun streĉita satento kaj ĉe la fino ree faris al ili ovacion.

Kiam ili revenis hejmen, Nilo elprenis el sia poŝto sufiĉe grandan monsumon kaj dupartiginte ĝin, donis unu duonon al Mateo.

„Jen kiam ni enspezis hodiaŭ vespere.“ li diris. „Ĝi estas pago por la parolado. Mi rakontis pri nia patrolando kaj pri viaj aventuroj. Laŭ justeco, la duono apartenas al vi.“

Mateo provis rifuzi, fine li devis akcepti la monon. Iliaj interrilatoj jam multe ŝanĝiĝis kaj, kvankam li ne ĉion komprenis, sed li jam tute forjetis la ideon pri la erarinta filo. Ricevinte nun la monon, li konfuziĝe rigardis s-ron Nilov. Li volonte montrus al li per ia maniero siajn dankemon kaj respekton. Liaj genuoj preskaŭ fleksiĝis por ĝistera saluto, liaj lipoj jam preskaŭ aliriĝis al la mano de la juna sinjoro. Sed ĉu la mieno de Nilov, ĉu la kune travivita semajno, io lin detenis. Tial li prenis la monon kaj, metinte ĝin apud si, diris:

„Pardonu, ne pensu pri mi ion malbonan. Ĉu tio estas multe da mono?“

„Ne tre multe, sed sufiĉe, por havigi al vi bonan kostumon“, respondis Nilov. „Vi surhavas la saman veston dum laboro kaj dum festtagoj.“

Mateo ŝvingis la manon.

„Mi estas ja simpla homo, laboristo.“

„Ĉi tie ĉiuj estas simplaj homoj, sed la laboristoj opinias sin ne malpli bonaj ol aliaj kaj

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.
Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio
Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Ŝidlovskaja.
(50-a daŭrigo.)
(Daŭrigota.)

Li finis sian paroladon per la peto doni ripozon al sia modesta samlandano, ne kutiminta travivi tiajn bonajn elmontrojn de publika simpatio. —

Kompreneble, la aŭtoro de la elokventa gazet-artikolo ne sciis, ke, kiam la urbanoj de Debltown disiĝis, Mateo ekspiris kun malpezigita koro kaj diris:

„Nu, ĉu fine ili ĉiuj foriris?“

„Jes“, respondis Nilov, preparanta kafon per petrola kuirlampo.

„Ha, ke la febro ilin ĉiujn ataku!“ sincere diris Mateo jam tute senfortigita.

Nilov ridetis sed nenion diris, komprenante, ke tiom da traviviĝaĵoj povis renversi eĉ tiun fortkorpan viron. Li rapide regalis sian gaston per varmega kafo kaj konsilis al li tuj enlitiĝi.

XXXII.

Mateo dormis pli ol dudekkvar horojn. Kiam li vekigis, la suno jam estis forlasanta la ĉambron, lumigante ĝin per siaj lastaj radioj. Nilov, ĵus reveninte de sia laboro, estis demetanta sian bluan bluzon, al kiu alglutigis lignaj rabatoj kaj segaĵoj. Eĉ en liaj haroj vidigis rabatoj.

Mateo dum kelke da tempo ne povis kompreni, kie li estas kaj kio al li okazis. Tial komence li kuŝis kun duone fermitaj okuloj, iom suspekteme sekvante la movojn de la juna sinjoro, timante, ke tio estas sonĝo, tuj anstataŭota de novaj malagrablaj aventuroj.

Dume Nilov senbrue sin alvestis, ŝanĝinte sian laboristan bluzon por malpeza lana kostumo, sidigis ĉe la tablo kaj malfermis libron.

En tiuj vestoj li tute ne siml'is laboriston, kaj en la memoro de la Loziŝcano reviviĝis bildo, kiu jam preterflugis foje lian imagon dum lia lasta feroja vojaĝo. Li rememoris la sinjoran domon apud Loziŝci, videblan el post la gardena verdaĵo. Inter la domo kaj la urbeto ekzistis delonga malamikeco kaj delonga proceso pri iu farma terpeco. La proceso estis komencita de iliaj gepatroj, daŭrigita de la gefiloj, kaj gajnis jen unu, jen alia partio. La afero minacis per grandaj malagrablaĵoj kaj komplikoj, kiam subite la maljuna sinjoro mortis. En lian domon alvenis la juna heredinto kaj en kunveno de la loĝantaro proponis fini la proceson, cedinte en ĉiuj punktoj. Kelkan tempon ankoraŭ la Loziŝcanoj braudis kaj interdiskutadis, ne komprenante la kialon de lia cedemo. Poste la plej sagaca konjektis, ke kredeble la juna sinjoreto fordiboĉis sian tutan monon, havas multe da ŝuldoj kaj pro tio deziras plej baldaŭ vendi la patran heredaĵon, al kio la proceso malhelpis. La Loziŝcanoj penadis ankoraŭ laŭeble prokrasti la aferon, fine la afero estis finita. La juna sinjoro ten forveturis, oni nenion plu aŭdis pri li. Restis iuj malklaraj famoj, sufiĉe diversenhavaĵoj, sed en ĉiuj variantoj ne favoraj por la juna sinjoro.

Kaj nun subite ekŝajnis al Mateo, ke antaŭ li sidas ĉe la tablo super la libro la sama juna sinjoro. Mire li komencis froti al si la okulojn. La lito sub li kraketis, Nilov ekrigardis posten.

„Nu, samlandano! Ĉu vi satdormis?“ li demandis afable. „Bone! Nun ni trinku kafon!“

Mateo leviĝis, konfuzita kaj embarasata, etendis siajn rigidigitajn membrojn. Hieraj li ekĝoĝis ĉe la vido de tiu viro, lia savinto, hodiaŭ li sentis sin iom ĝenata en lia ĉeesto. Krom tio li vidis nun, ke en la ĉambro staras unu sola lito, do

Alian fojn mi iris en landon, kie ŝajne laŭ la legitaj komunikoj nia movado devis esti brilega. Sed restante kelkan tempon tie, mi konvinkigis, ke granda parto estis troigita, kaj la atingitaj sukcesoj paperaj, kiuj tute ne havas valoron praktikan por nia movado. Serĉante la kaŭzon, mi trovis kiel preskaŭ ĉie, ke la tuta laboro por Esperanto kuŝis je unu sola persono, plejofte la prezidanto de la societo. Se nun tiu persono el la kaŭzo estas malhelpata daŭrigi la laboron por nia afero, preskaŭ ĉiam post mallonga tempo la movado en la koncerna urbo ekdormas kaj dormadas! Kaj ĉiuj sukcesoj, kiujn oni pli frue eble atingis, perdis per tio la valoron, kaj ne malofte la tuta antaŭe farita laboro estis vana! Tiun faktan mi jam ofte povis konstati.

Tiun sistemon ni devas kontraŭbatali, ĉar sendube ni neniam atingos nian finan celon, se nur kelkaj entuziasmiglitaj Esperantistoj laboras, laboregas kaj la aliaj dormas en la vera senco de la vorto. Ĉiu Esperantisto en la grupo devas preni sur sin iun se ankaŭ malgrandan taskon en la intereso de nia granda afero. Nur tiamaniere ni atingos konstantajn progresojn.

Karaj gesamideanoj! Estonte ni nepre devas labori en diversa rilato pli serioze ol ĝis nun. Ni ne trompu nin mem. Ni ne skribu en la gazetaro pri sukcesoj, kiuj en vero ne ekzistas. Ni ne pligrandigu nian movadon, tio nur malutilas al ni. Ofte oni nur trograndigas por plaĉi kaj ĝojigi la ceteran Esperantistaron! — Antaŭ ĉio ni frapu al nia propra brusto kaj demandu nin, ĉu ni mem estas veraj Esperantistoj en la senco de nia kara Majstro. Ĉu ni efektive praktike uzas Esperanton kaj faros ĉion nepre necesan por nia movado? Se ne, ni ankoraŭ hodiaŭ komencu plibonigi nin.

Ni ne rigardu Esperanton kiel ilon por pasigi la tempon. Por ni Esperanto devas esti sankta afero. Do, ekkonante tion, ni agu laŭ tio, por ke ni kiel eble plej baldaŭ atingu nian altan celon. Tial antaŭen al serioza laboro!

Glosoj.

Bedaŭrinde, s-o Sappl en sia ĉi-supre represita artikolo estas prava en multaj punktoj. Efektive, trograndigo de niaj sukcesoj povas nur damaĝi al nia movado. Tamen ni ankaŭ ne falu en la malan ekstremon: nel aŭ trolmalgrandigi niajn sukcesojn. La Esperanta movado nuntempe marŝas bonege kaj tute kontentige; kio ofte mankas, estas sufiĉa seriozeco kaj la konscio pri la ĉefa, reala celo de la helplingva movado.

Kiel ĉefa eldonanto kaj redaktoro de ET mi, almenaŭ, ĉiam klopodis raportil nur konstatalejn kaj konstatitajn faktojn, kaj al miaj kunlaborantoj mi ankaŭ ĉiam konsilis, raportil nur severe laŭfakte kaj laŭvere. Estas bedaŭrinde, ke kelkaj entuziasmuloj, tradukante scilgojn el ET, kutimas „plibeligi“ niajn raportojn per trograndigaj vortoj kaj fanfaronaj frazoj, tiamaniere estigante dubeblojn, malklaraĵojn aŭ eĉ malveraĵojn, pri kiuj oni tamen ne povas respondecigi ET.

Ĉu estas la devo de UEA-delegito, havigi al alia eble nekonata al li Esperantisto, precipe en nuna tempo de loĝeja manko, malmultekostan loĝejon, pri tio mi ne volas diskuti. Laŭ mia opinio tio dependas de la tempo, informiteco kaj bonvolo de la koncerna delegito kaj estas virto multloke kaj multfoje trovebla, pro kies kelfoja malesto oni tamen — laŭ mia opinio — ne rajtas riproĉi la delegiton. Kelkaj delegitoj, iam plej gastigemaj rilate al samideanoj, forgesis tiun virton ankaŭ pro tio, ke ekzistas iuj impertinentuloj, kiuj estigas por si la rajton postuli de tute fremdaj Esperantistoj, pretekstante la „internan

ne volas diferencii de aliaj per kostumo. Mi konsilas al vi aĉeti tolaĵojn kaj vestojn.“

Mateo kunfuzite klinis la kapon.

„Volu pardonu“, li diris. „Mi ne dezirus malobei al vi. Sed diru, mi petas: ĉu estas eble ĉi tie laborenspezil monon por vojaĝo?“

„Por kia vojaĝo?“

„Al la hejmo, kompreneble!“ pasle diris Mateo. „Vidu: hejme mi vendis mian domon, kaj la ĉevalon, ankaŭ la kampon. Sed nun mi estus preta labori kiel bovo por reveni kaj fariĝi la plej mizera laboristo tie, hejme, en la patrujo.“

Nilov faris kelkajn paŝojn en la ĉambro pri io meditante, poste haliis antaŭ Lozinski kaj diris:

„Aŭskultu, Lozinski. Laborenspezil necesan sumon certe estas eble. Sed ĉiu homo devas scii, kien li faras. Por kio vi alvenis ĉi tien?“

„Hal!“ diris Mateo, svingantela manon. „Venas iafoje ideoj en homan kapon!“

„Ĉu vi ne povas rememori, kiaj ideoj venis tiam en vian kapon?“

Mateo sulkigis la frunton, kaj ne malmulte li mem miris, kiel malfacile pensoj kaj paroloj elliras el lia kapo.

„Hal! Homo certe deziris . . . pecon da tero, libera . . . ke oni havu sufiĉan lokon por movi la plugilon. Kaj . . . du bovojn . . . bonan ĉevalon, bovinon . . . fortan veturilon.“

„Ankoraŭ kio?“

Mateo sentis, ke krom la nomitaj objektoj en lia animo restas ia malklara restaĵo. Aperis antaŭ li la vizaĝo de Anna.

„Poste,“ li daŭrigis sen peno, „homo ja estas plenaĝa propran domon, do edzinon.“

„Eble, ankoraŭ ion?“

„Ankoraŭ. Se estus eble preĝi en sia preĝejo.“

ideon“, doni al ili loĝejon kaj nutraĵojn, eble por pluraj tagoj, aŭ eĉ monon. Tion, ekzemple, faras certaj t. n. „globe trotiers“ (mondvagemuloj) aŭ „naturhomoj“ aperantaj ofte en kostumo, kiu ridindigas nian movadon. En la plej multaj okazoj tiuj personoj apenaŭ scias kelkajn frazojn en nia lingvo, aŭ ili lernis Esperanton speciale por la celo vivi je la kostoj de aliaj tro bonkoraj Esperantistoj. Al la Esperanta movado ili ne utilas; la propagando, kiun ili pretendas fari por Esperanto, estas ofte ĝuste la malo. Ili eble atentigas kelkajn dekduojn aŭ eĉ centojn da personoj je Esperanto; sed la propaganda valoro de tia atentigo estas negativa, almenaŭ ĉe seriozaj homoj. Kaj seriozeco ja estas tio, kio plej ofte mankas en nia movado: ĉe nia propagando, en niaj grupoj kaj kursoj, al niaj entreprenoj*).

La „Internan ideo“ sole ne venkigos nin. Ĝi estas bona kaj bela. Kaj granda, eble la plej granda parto de la Esperantistaro bezonas ĝin. Ĝi estas la fonto, el kiu multaj ĉerpas sian idealismon, sian entuziasmon por nia afero. Ĝi estas la alta atmosfero, en kiu sole multaj sin sentas feliĉaj. Sed ĝi ne estas nia ĉefa celo. Nia ĉefa celo estas la enkonduko de helplingvo, per kiu diverslingvanoj povas seninterprete interrilati unu kun alia, do celo pure praktika. Ĉiu alta celo povas esti nur duagrada, apuda. Kaj ĉar la mondo nur konvinkigas per praktikaj faktoj, ni do klopodu antaŭ ĉio, kiel tiajn faktojn en la praktiko, por ke ni povu per ili konvinki la mondon. Dume ni ne bezonas forgesi la „internan ideon“; sed ni ne vualu per ĝi antaŭ la skeptika publiko la esence praktikan, realan ĉefcelon de nia movado!

Seriozeco, praktikemo, veremo — jen tri virtroj, kiujn antaŭ ĉiuj aliaj ni devas apliki kiel batalilojn en nia milito kontraŭ antaŭjuĝoj, indiferenteco kaj skeptikeco. Tiel ni certe venkos!

T. J.

*) Pri la manio, ĉe la relative ankoraŭ malgranda forteco de nia movado krei en ĉiu provinceto, en ĉiu plimalepli grava regiono aŭ loko „Esperantistaran Centron“, specialan „Esperanto-Servon“, „Esperanto-Infirmejon“ ktp., pri la en lasta tempo denove vastiĝanta „gazetfonda febro“ kaj pri aliaj malsanoj en Esperantujo eble alian fojon mi havos okazon paroli pli detale.

Komerco.

Komerca ĉambro de Cremona (Ital.)

donis monsubtenon de 100 liroj al la Esp. grupo de Cremona; la tiea Popola Banko donis 150 lirojn.

La V-a Specimena Foiro de Valencia, Hisp. okazonta en venonta majo, alprenos Esperanton por sia propagando.

Katolikaro.

Kial silentas ET deŝt kelkaj monatoj pri la Esperanta movado inter la katolikaro? Ĉar en tiu movado estiĝis vera konfuzo, eĉ pli: malkonkordo, akra disputo kaj polemikado. Kaj ĉar ni ne volis favori la unu aŭ la alian partion, ne estante sufiĉe informitaj pri la afero.

Sed hodiaŭ la situacio ŝajnas al ni iom klarigita. Ni konstatas, ke unuflanke oni restarigis la laman IKUE, kiu estas poresperanta propaganda organizajo, kaj ke aliflanke fondiĝis „Internacio Katolika“ (Ika), kiu estas persperanta organizajo celanta la internacian kunigon de la tutmondaj katolikoj en unu granda mondligo, por kiu celo ĝi uzas la helplingvon.

Do estonte ni ree akceptos scilgojn de kaj pri ambaŭ organizaĵoj, sed nur, se ili estos liberaj de polemikajtoj.

En lia cerbo ekbrilis ankoraŭ penso pri libereco, sed ĝi estis tiom malklara, nedifinebla, ke li pri tio nenion diris.

Nilov atendis iomete. Lia vizaĝo estis serioza kaj kortuŝita.

„Ĉion ĉi tion vi povos trovi en Ameriko!“ li diris akre kaj firme. „Ĉion, kion vi serĉas. Por kio do forveturi?“

Kaj vidante, ke Mateo iom malgajigis la akra tonon, li aldiris:

„Vi jam travivis la plej malfacilan tempon; ĉe la unuaj paŝoj ĉi tie multaj pereas. Nun vi jam estas trovinta vian vojon. Restu ĉi tie ankoraŭ kelkan tempon, ekkonu la landon, la homojn . . . Sed se tamen io estos altiranta vin tien . . . estos altiranta tiel forte, ke vi ne povos kontraŭbatali, nu, tiam . . .“

En la voĉo de Nilov sonadis pasia emocio. Mateo rimarkis tion kaj diris:

„Sed vi mem, — pardonu, — vi ja deziras forveturi?“

La vizaĝo de Nilov ree iom malsereniĝis.

„Jes,“ li diris. „Mi havas miajn proprajn motivojn.“

„Do vi ne trovis ĉi tie tion, kion vi serĉis?“ Nilov malfermis fenestron kaj dum kelke da tempo rigardis eksteren, lasante al la karesa venteto ventumi lian vizaĝon. Tra la fenestro rigardis senbrua nokto, steloj lumis, proksime trembriletis la fajroj de Debltown, fabrikaj forno-tuboj eligis fumon, hejtataj post festitaga ripozo por la morgaŭa laboro.

„Mi trovis ĉi tie tion, kion mi serĉis,“ respondis Nilov, deturnante de la fenestro sian emociitan, ruĝiĝintan vizaĝon. „Sed — aŭskultu, Lozinski! Ĝis hodiaŭ ni ambaŭ kvazaŭ ludas kaŝludon. Vi ja min rekonis?“

„Mi vin rekonis“, konfuzite konfesis Mateo. „Ankaŭ mi vin rekonis. Mi ne scias, ĉu vi komprenos min, sed almenaŭ pro tio, ke

Lernejo.

Kiel oficiala delegito de Ĉsl. Asocio Esperantista vizitis d-ro Kamaryt la pedagogian konferencon en Genève.

En Bologna (Italio) oni rememorigis la datrevenon de l' naskiĝotago de d-ro Zamenhof per serioza laboro: matene skribaj ekzamenoj al la komunumaj ĝeinstruistoj, kiuj sekvis la kurson de d-ro Toschi; posttagmeze inaŭguro de nova kurso por ĝeinstruistoj; vespere prelego al Esp. kurso de p-ro Getuljo Sanchioni en la privata lernejo „Italia“.

Ce la Popola Universitato en Roma s-o prof. B. Migliorini gvidas Esp. kurson.

Edukista kunveno en Londono.

Dum la jara konferenco de la edukistaj asocioj, kiu okazis la 5. jan. en Universitata Kolegio en Londono, aparta sekcio priiraktis la temon „Esperanto en la lernejo“.

Dr. C. W. Kimmins, kiu prezidis, asertis, ke li tre interesiĝas pri la Esperanta afero, ĉar li estas prezidanto de la Eduka Komitato de la Ligo de Nacioj, kaj ĉar por kompleta atingo de la idealoj de la Ligo komuna interkomunikilo estas nepre necesa.

F-ino C. M. E. Morton raportis pri siaj spertoj en la instruado al infanoj kaj diris, ke la infanoj, kiuj lernis Esperanton, pli bone komprenas la nacian lingvon, ol la aliaj.

Hispanio.

En Valencia kurso funkciadas regule en la Universitato kun ĉ. 70 gelearnantoj (kelkaj ĝeinstruistoj), sub gvidado de s-o T. Ventura, profesoro de liceo. — En la grupo „Studenta Juneco“ en Girona s-anoj Font kaj Costa instruas Esperanton al pli ol 30 lernantoj, ĉiuj studentoj aŭ instruistoj.

Laboristaro.

Ĉeĥoslovakio.

„La Progreso“ raportas interalie:

Laborista Asocio Esperantista en Plzen aranĝis de 1. okt. ĝis la fino de la jaro 1921 sekvantajn kursojn en la ĉirkaŭaĵo de Plzen: Štáhlavý (45 p.), Ledce (21 p.), Dolní Lukavice (35 p.), Horní Lukavice (22 p.), Újezd apud Doubravka (25 p.), Stupno-Brasy (17 p.). Krom tio estas aranĝitaj unu kurso en Karlov-Plzen (31 p.) kaj du kursoj en Plzen, laborista domo „Peklo“, posttagmeze kaj vespere (87 p.). Kelkaj kursoj estas jam finitaj, kelkaj ankoraŭ daŭras, krom tio estas en „Popola Scenejo“ ĉiumerkrede kaj ĉiuvendrede konversacio por progresintoj.

Italio.

En Roma estas starigita „Roma Internaciista Esp. Grupo“, celanta la akcepton de Esperanto inter la revoluciemara laboristaro. Aligis la parlamentano O. Morgari kaj N. Bombacci. La anoj estas jam 60. Kurso malfermita de hon. Morgari kaj gvidata de s-ano E. Migliorini ĉe la Popola Domo ĵus sukcese finiĝis. — La kongreso de „Latinuĵa Junula Socialistista Federacio“ aprobis unuvoĉe tagordon, proponitan de s-ano P. Bonanni, tufavoran por Esperanto. — En Greco Milanese formiĝis laborista grupo kun ĉ. 40 membroj. Elementan kurson gvidas s-o L. Rosa, duagradan kurson s-o J. Mainardi. (Laŭ „L' Esperanto“)

Belgio.

Antverpena Grupo de Esp. Diamantistoj aranĝis la 7. jan. bonfaran feston en la Diamantborso; ĉeestis ĉ. 800 personoj. La sukceso estis granda. Restis bela sumo je la profito de „Zonnestraal“ (tuberklozo-kontraŭbatalo).

mi interrilatas ĉi tie kun vi . . . ankaŭ kun aliaj . . . kiel egaluloj, kiel fratoj . . . ne kiel malamikoj . . . pro tio sola mi estos eterne danka al ĉi tiu lando . . .“

Mateo aŭskultis pene kaj streĉite, ne plene komprenante sed kun stranga emocio.

„Tamen mi deziras reveni Rusujon“, daŭrigis Nilov. „Tion vi ne komprenas? Ĉi tie mi trovis multon, kion mi serĉis, sed . . . tion ĉion oni ja ne povas kunporti al la hejmlando . . . Mi jam duan fojon revenas . . . Ekzistas tia malsano . . . Nu, ni lasu tion! Mi ne scias, ĉu vi hodiaŭ min komprenas? Eble iom poste? En la hejmo mi sopiras al tio, kio estas en Ameriko; ĉi tie mi sopiras al la hejmo . . .“

Nilov eksilentis, kaj ili longe ankoraŭ rigardis tra la fenestro al la nokta ĉielo, al la milda karesa sed fremda nokto. Nilov meditis pri tio, ke li baldaŭ ĉion ĉi forlasos kaj restigos post sia dorso tutan epokon de sia vivo. Dume Mateo ial ekmemoris la maron kaj ĝian profundajn, enigman, misteran, nekompreneman . . . Same nekomprenema nun ŝajnis al li multo en la vivo kaj same allogis lian ankoraŭ nekleran penson . . . Rememorante la jusan interparoladon, li sentis, ke li ankoraŭ ne bone sin mem konas, ke, krom tio, kion li nomis al Nilov, krom domo, bovino kaj kampo, krom la bela vizaĝo de Anna, ekzistas ankoraŭ io, kio lin allogas kaj allogos, sed kio tio estas, li tute ne povus diri, ne povus difini sian propran revon . . . io profunda kiel maro, kaj alloga, kiel perspektivo de vekliĝanta vivo

XXXIII.

Nia rakonto proksimiĝas al la fino.

Post kelke da tempo, kiam Mateo jam ekkonis la lingvon, li fariĝis farmlaboristo ĉe tiu korpulentan germano de Debltown, kiu — mem fortegulo — ŝatis en Mateo lian forton. Ĉi tie Mateo lernis uzadi maŝinojn, kaj la sekvintan printempon Nilov

En diversaj landoj.

Ni resumas el „Sennacieca Revuo“: En Rio de Janeiro, Brazilio, fondiĝis laborista Esp. grupo.

En Troyes, Franclando, 50 personoj sekvas kurson ĉe la Laborborso. En Arcis-sur-Aube apud Troyes ĝupfondo kaj kurso kun 15 p.

En Erfurt, Germanio, kurso kun 15 p. Pri kursoj en Riesa kaj Gröba ET jam raportis.

Donacoj.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pluaj donacoj:

150. Eug. Papenstein, Halle a. S. 10 gmk. — 151. Rich. Schütze (Ferna-Versand), Plauen 10 gmk. — 152. Dimitr Simeonov, Sofia 10 levoj. — 153. N. N., Dresden 10 gmk. — 154. D-ro Otto Müller, Echterdingen 10 gmk. — 155. Lino Hicovich, Trieste 2 liroj. — 156. Val. Klein, Mannheim-Rheinau 10 gmk. — 157. Franz Döring, Freiburg i. Br. 150 gmk. — 158. H. M. v. Griensven, Ootmarsum, Nederl. 100 gmk. — 159. F. Ric. Jonava, Litovio 10 gmk. — 160. W. Kaweck, Danzig 25 gmk. — 161. W. Lühdemann, Hamburg 5 gmk. — 162. Anoj de „Espero“ en Tallinn, Estonio 135 gmk. — 163. Stéfano Györy Nagy, Miskolc 24 gmk. — 164. Hans Naehring, Kaunas, Litovio 20 gmk. — 165. Gg. Johannes, Düsseldorf 10 gmk. — 166. D-ro W. Döhler, Riesa 10 gmk. — 167. Aug. Junker, Kö'n 20 gmk. — 168. Esp. Grupo Neugersdorf 50 gmk. — 169. F-ino N. Boon, Hago 2½ hfl. — 170. S-ino Mammen, Grenaa 5 dan. kr. — 171. Kolekto dum kristnaska post-festo de Esp. Grupo „Obstine antaŭen“ en Werdau 70 gmk. — 172. Liudas Alseika, Dotnava, Litovio 26 gmk. — 173. F. Z. en W. 100 aŭstr. kr. — 174. G. van Heek, Hengelo 4 hfl. — 175. Belga leŭtenanto van Wanseele, Köln 20 gmk.

Por malsatantaj rusoj

ni ricevis 5 danajn kronojn de s-ino M. Mammen en Grenaa, 100 gmk. de ges-oj Büemann en Hamburg, 5 sved. kronojn de s-o Gustav Jönsson en Hällefors kaj 50 gmk. de s-o Kaweck en Danzig.

Por „Kristana Espero“

internacia kristana gazeto Esperantista aperanta en Laihla, Finnlando, s-ino Mammen en Grenaa donacis 5 danajn kronojn kun la peto, ke ni atentigu la tutmondajn samideanojn pri la graveco kaj ankaŭ pri la malfacilaĵoj de tiu ĉi gazeto. Kristanaj Esperantistoj, kiuj volas subteni „K. E.“, bonvoln sendi abonpagojn aŭ donacojn rekte al la adreso: „Kristana Espero“ (pastro Päitälä), Laihla, Finnlando.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Esperanto en Pola lando.

Bydgoszcz. Dum speciala UEA-kunveno oni novelektis: del. s-o Pankratz, vicdel. s-o Pregel. Malnova s-ano Hinc el Lodz, bona konato de Grabowski ĉi, transloĝinte Bydgoszcz-on, transdonis sian riĉan Esp. bibliotekon je la uzado de la ĉi tieaj s-anoj. S-o Pregel gvidas polingve tri kursojn: por komencantoj-plenaĝuloj (15 p.); por knaboj (12 p.) kaj perfektigan (10 p.); s-o Pankratz gvidas germanlingve kurson por progresintoj. Ĉe la lastaj elektoj por la urba parlamento oni ankaŭ elektis du Esperantistojn, s-ojn Kronenberg kaj Pankratz.

Lodz. La 10. dec. paroladis s-o Zys en ejo de profesuloj pri „Esp. kaj laboristaro“. La sukceso de tiu ĉi parolado estis, ke — dank' al klopodoj de urbestarano s-o Rapalski — oni

antaŭ sia forveturo rekomendis lin al la hebrea kolonistoj. Nilov mem fervojaĝis hejmen, promesinte skribi al Mateo el la patrolando.

Nun al ni restas malmulto por rakonti.

La artikolo de la „Kuriero de Debltown“ pri la fina aventuro de la „sovaĝulo“ estis represata en kelkaj gazetoj, precipe de provincaj urboj, nekontentaj pri la „fanfaronado“ de Nov-Jorkanoj, kiuj ĉi tiun fojon faris tiel gravan eraron. La Nov-Jorkaj gazetoj faris el ĝi nur mallongajn kaj sekajn faktajn eliraĵojn, ĉar en la sama tempo al la supraĵo de la politika vivo de la lando venis unu el la grandaj demandoj, kiuj moviĝigas en la fundo de la ekscitita societo ĉiujn principojn de l' amerika politiko . . . io, simila al uragano, kiu forblovis la portreton de la sovaĝulo kaj la rideantan kapon de la gaja fraŭlino Lizzi, kiu faris surprizon al siaj gepatroj, kaj multajn aliajn famulojn, kiuj kiel papilioj flugas en la suno de la gazeta tago tiel longe, ĝis ilin forblovas la apero de la unua nubeto je la gazeta horizonto. (Finota.)

Pri la morto de Vladimir Korolenko, la aŭtoro de nia finiĝonta feliĉtono „La Senlingvulo“, ni ricevis nekrologojn de kvin samideanoj el la landoj Rusa, Pola, Latva kaj Estona. Tio pravas la grandan intereson, kiun havas nia legantaro por ET, por nia feliĉtono kaj por ties aŭtoro. Al la sendintoj de la nekrologoj ni dankas kore.

Eble multaj legantoj deziras posedi la rakonton „La Senlingvulo“ en libra formo. Por tiu celo ni presis iom pli ol 350 ekzemplerojn, kies prezo estos po ĉ. 25 gmk., por bonvalutaj landoj 50% pli. La libro estos havebla eble post du monatoj; sed pro la malgranda provizo estas konsilinde jam nun mendi ĝin ĉe la administrejo de ET.

organizoj specialajn Esp. kursojn por laboristoj. — La 15. dec. okazis Zamenhof-vespero. Paroladis s-anoj Zys pri „Zamenhof-idealisto“ kaj Leizerovicz pri „Zamenhof-homaranano“.

Leszno. S-ano Monarszynski gvidas kurson kun 10 seminarianoj.

Miloslav. Dank' al klopodoj de s-ano poŝtestro Prabucki, fondiĝis la 4. jan. grupo „Amika Rondo Esperanta“ kun 22 membroj. La estraro konsistas el s-anoj okupantaj la plej gravajn oficojn en la urbo. Propagandan paroladon faris s-ano W. Monarszynski. Novan kurson kun 20 p. gvidas s-ano Prabucki. „Oredownik Wrzesinski“, oficiala gazeto por tiuj regionoj, favore raportas pri Esp.

St. Swieciany (Meza Litovio). Vigla intereso inter polaj ĝendarmoj. Kurson gvidas s-ano ĝendarmoj Czywczynski.

Pola Esp. Servo.

Cehoslovakio.

En Domazlice s-ano Kubasek gvidas kurson kun 24 personoj. Vidu ankaŭ sub „Lernejo“ kaj „Laboristaro“

Italio.

La Esp. Grupo de Cremona ricevis monsubtenojn de la komunumo Cremona (1000 lir.), de la komerca ĉambro (100 lir.), de la provinca deputacio (100 lir.) kaj de la popola banko (150 lir.). En Figline fondiĝis grupeto dank' al klopodoj de s-ano p-ro Meazzini.

En Soave kurso gvidata de s-ano Reni. En Venezia kurso por virinoj. Vidu ankaŭ la aliajn rubrikojn: Lernejo, Komerco, Blinduloj, Laboristaro kaj Skoltoj.

Hispanio.

Parte laŭ propraj informoj, parte laŭ „Kataluna Esperantisto“ ni raportas:

En Barcelona nia movado estas tre vigla. La ses grupoj aranĝis entute kvar elementajn, kvar superajn kaj du ĝeneralajn kursojn.

La grupo de Manresa kalkulas 40 membrojn kaj komencis du kursojn (unu por fraŭlino).

En Lleida s-ano Abadal gvidas kurson. Oni intencas restarigi la grupon „Ilerda Espero“.

Tri kursoj (unu por infanoj) en Palma de Mallorca.

La 8. jan. okazis en Anglès (urbeto apud Girona) propagandaj paroladoj de s-anoj Domenech, Font Giral, Gili-Norta kaj Grau, sub prezido de la urbestro. La urbestro afable pruntedonis elon por fondota grupo.

En Valencia ET nun estas regule elmetata kaj vendata de la plej grava librovendejo.

Vidu ankaŭ sub „Lernejo“ kaj „Komerco“

Cehoslovaka ministro vizitis Esp. societeton en Kopenhago (Dan.).

London, 16. jan., okazis en Kopenhavn (Kopenhago) kunveno de „La societo de Esperanto-interesatoj“ (Foreningen af Esperanto-intereserede). Post lerta planulado de s-ano Gg. Jespersen f-ino Astrid Rybo, prez. de la societo, rakontis pri la kongreso en Praha, kaj la kasisito de la societo s-ano Krejl prezentis lumbildojn pri la sceraj kongresvolagoj de la danaj Esperantistoj. El la aŭskultantoj kelkaj personoj sin enskribis je kurso. La ministro de Cehoslovakio s-ano M. P. Bozinov kaj la sekretario de la cehoslovaka senditaro s-ano d-ro B. Kuchka honoris la societeton per sia ĉeesto.

Ido propagandas por Esperanto.

Pasintan aŭtunon la konata Idisto prof. Jespersen el Kopenhago skribis artikolon por Ido kaj kontraŭ Esperanto en diversaj gazetoj, i. e. en „Tyns Social-Demokrat“, Odense, Danujo. S-ano Alfr. Christensen defendis Esperanton, kaj la polemiko

faris tiel grandan atenton, ke la Esperantistoj de Odense estis petataj aranĝi kurson en Langeskov, vilaĝo je 15 km. de Odense. La kurso sukcesas kaj grupo estas fondota. Tiam rezultaton prof. J. certe ne atendis!

La du Esp. societoj en Odense unuiĝis de 1. jan., kaj la nova societo, „Odense Esperanto-Forening“, havas nun 117 membrojn. En la okazantaj kursoj partoprenas pli ol 200 personoj. La nova estraro konsistas i. a. el prezidanto komerclernejestro N. C. Carlsen, vicprez. s-ano Alfr. Christensen, sekr. s-ano M. Palsberg. La oficiala urba legoĉambro nun posedas malgrandan Esp. bibliotekon, kaj diversaj Esp. gazetoj, inter ili ET, kuŝas tie. La gazetaro de Odense estas tre favora al Esperanto.

Esperanto anstataŭ angla lingvo.

La Norda Packongreso, okazinta en Kopenhago dum la pasinta somero, pritraktis la demandon pri internacia korespondala lingvo. La plimulto de la danoj deziris Esperanton, sed la norvegoj kaj svedoj preferis la anglan lingvon, kaj tiurilata propono estis akceptata. Post la kongreso tiu ĉi akcepto vekis tiel laŭtan proteston, ke oni nun — laŭ la dana gazetaro — ŝanĝis la akcepton kaj anstataŭ la angla lingvo nun uzos Esperanton en la internacia rilatoj.

Franclando.

La urba konsilantaro de St. Etienne donis 300 fr.-an subvencion al la grupo; jen la 12-a subvencio por la grupo.

Liberurbo Danzig.

La 5. jan. Danziga Esp. Asocio havis jarkunvenon. Laŭ la kasraporto la enspezoj sumiĝis 17428 gmk, la elspezoj 17935 gmk. Elekta estraro: B. Ketterling (prez.), Bernh. Aeltermann (vicprez.), Max Amort (sekr.), W. Hoffmann (kas.). — Ekzercaj vesperoj por progresintoj ĉiujauĉe vespere je 7 h. en ejoj de „Danziga Virina Klubo“, Promenade 5.

La 7. jan. okazis elekto de la delegitoj de UEA: delegito fariĝis redaktoro B. Klebratowski, vicdel. dipl.-ing. Max Neumann. En Danzig UEA nun havas 15 membrojn.

Germanio.

En Helmstedt s-anoj Pape, Luer kaj Resch aranĝis la 20. jan. propagandan kunvenon kun parolado kaj ekspozicio. Kurson kun 25 personoj kaj alian kurson por 5 instruistoj nun gvidas s-ano Pape. Kunveno „Gasthof zum Löwen“, vendrede je 8 h.

El Saksa lando (Germanio).

Grupoj fondiĝis en Brand-Erbisdorf kaj en Freiberg. La 14. jan. la grupo de Brand festis sian unuan bone sukcesintan vintrofeston. En la komerclernejaro de Freiberg Esperanto estas instruita kiel laŭvola fako.

Blinduloj.

Laŭ „L' Esperanto“ la administra konsilantaro de Instituto por Blinduloj „David Chiossone“ en Genova (Italio) akceptis peton de nia s-ano C. Ricca pri instruado de Esperanto. Kurso komenciĝis.

Vidu ankaŭ sub „Donacoj“.

Skoltoj.

„L' Esperanto“ raportas pri tri kursoj por junaj skoltoj en Venezia (Italio), gvidataj de s-ano F. Pizzi. En Genova s-ano Ricca klopodas aranĝi kurson ĉe skoltoj.

Kie nuntempe restadas Hans Petzold?

De s-ano Goreck, prezidanto de la Esp. grupo Perleberg, ni ricevis sekvantan leteron:

Ni rilatas je nia alvoko pri Hans Petzold kaj dankas pro via afableco ripeti la alvokon. Hodiaŭ ni povas scii vin, ke la alvoko sukcesis. Antaŭ nelonge ni ricevis el Poznan (Polujo) komunikon de iama fremdula legiano, ke la serĉato de ni fakte servis en la fremdula legio, kaj ke li (la polo) interkonatiĝis kun la serĉato en Mainz en la monato februaro 1921. Ni do ĝojas, sukcesinte kaŭze de la ripeto de la alvoko, kaj ne preterlasas sciigi al vi tion. Bedaŭrinde niaj esploradoj kun tio ankoraŭ ne estas ĉe la fino, ĉar ni ne scias la nuntempajn restadejojn de Hans Petzold. Espereble ni atingos ankaŭ tion. —

Eventualajn informojn pri la nuntempa restadejo de s-ano Petzold oni bonvolu direkti al s-ano August Goreck, Wittenbergerstr. 13, Perleberg, Germ.



Framasonio.

La unua germana framasona loĝio de la „Komuna Internacia Framasonio“ (A. I. F.) fondiĝis en Frankfurt a. M. per la helpo de holandaj samideanoj, kiuj esperantlingve propagandis la fondon. La ĉi-supra bildo montras de maldekstre dekstren la gefondintojn: Riccardo Bassi (italo), Franz Farwerk (holandano), Karl Barthel (fondinto de la Esp. Fram. Ligo), Br. Klungenberger (usonano), Rob. Rübsamen (Frankfurta Esp. Centralo), Otto Post kaj Karl Schwabenthal (prezidanto de la loka Esp. kartelo) kun edzino Marie Schwabenthal, kiu nun estas la unua framasonino en Germanio; ĉar la A. I. F. aludas virinojn samrajte kiel virojn. Pri A. I. F. aŭ Internacia Ko-Framasonio oni ricevas klarigantan esperantlingvan broŝureton de Frits Faulhaber, Amsterdam, Nederlando, Leydsche gracht 19, aŭ germanlingve de Karl Schwabenthal, Frankfurt a. M., Dunckerstr. 4 (afrankokostojn kaj unu germ. markon).

En Aleksandrio (Egipt.) antaŭ nelonge fondiĝis Esp. framasona loĝio de la sama ordeno, kies internacieco pro tio denove pruviĝas.

Atentigo.

La „Esperantidoj“ sekvas la malindan propagandan metodon de la Idistoj, uzante Esperanton por siaj celoj. La Esperantida „konsulo“ por Polujo, s-ano Zgorzewski en Varsovio, Sienna 29, propagandas Esperantidan kiel „simpligitan lingvon Esperanto“, trompante tiel la neesperantistan publikon. Ni energie protestas kontraŭ la

Recenzo.

LIBROJ.
NAVRAT Ĉ. S. LEGII KOLEMVEJA DOVLASTI. Transmara Revuo de Ĉsl. Legioj el Siberio Cehoslovakujon. Eldonis Pamatinik Odboje en Praha 1921 helpe de Bohema Esperanto Servo (ing. C. Berger) en Moravany. Prezo 14 sv. fl. 140 k., 580 gmk.

Belega albumo kun 229 reproduktaj laŭ fotoj de pli malpli granda historia aŭ kulturhistoria intereso. La bildoj kondukas nin kun la Ĉsl. legioj tra prekaŭ la tuta mondo. Ni akompanas ilin tra la vastaj stepoj de Siberio; ni admiras kun ili la strangajn pagodojn, palacojn, pordojn, murojn ktp. de Ĉinujo, la admirindajn templojn de Hindujo, la ruinojn de Babilono, la graciajn minaretajn kaj grandiozajn kupolojn de mahometana moskeo, la piramidojn de Egiptujo, la senfinan oceanon, la riĉan vegetaĵon kaj belajn fraŭlinojn de Honolulo, la kanalon de Panama, la akvofalojn de Niagara, la „nuboprintojn“ de New-York, ktp., ĝis fine ni alvenas kun ili en historia Praha, la bela ĉefurbo de la Ĉsl. respubliko, konata al ni pro la XIII-a kongreso.

Mallonga enkonduka teksto klarigas la tutan albumon; krome ĉiu unuopa bildo estas klarigita per kelkaj vortoj. La tekstoj estas ĉiuj en Esperanto. Tion pli oni miras, kial sole la titolo estas en ĉeĥa lingvo. La enkonduka teksto estas, kompreneble, tute naciema kaj enhavas kelkajn kontraŭgermanajn, — jen eble la sola riproĉindaĵoj al tiu ĉi alie nepe rekomendinda verko, kiu estas vera ornamo de ĉiu Esp. biblioteko. (R-ano.)

DIE WELTHILFSSPRACHE ESPERANTO. De d-ro Möbusz. 16 pĝ. 11 x 15 cm. 11-15000. Berlin 1921. Eldonejo Friedr. Ellersiek. Berlin S. 59. Prezo 0,50 gmk., por bonvalutaj landoj 0,90 gmk.

Nova eldono de la konata bona propaganda broŝuro, kompletigita per la plej novaj faktoj.

ESPERANTO-LEHRBUCH FÜR VOLKSSCHULEN (Esp. instrulibro por popollernejoj). Teil I: Unterstufe. De Georg Streidt. 56 pĝ. kaj kovrilo. 15 x 22 cm. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig. Esperanto-Fako. Prezo karton. 10 gmk.

La preparolita verko — destinita por la popollernejo, t. e. kiel klariga d-ro Dietterle en la antaŭparolo, por la du superaj klasoj de la popollernejo — konsistas el du volumoj, kies unua sus aperis. La libro estas verkita laŭ principoj de la „rekta metodo“ kaj de la „laborinstruo“; ĝia aranĝo estas tre lerta, oni sentas ĉe ĉiu leciono, ke ĝin elstaris sperta pedagogo. Laŭ mia opinio ĝi estas unu el la plej bonaj Esp. instrulibrojn kaj perfekte plenumas sian specialan taskon. Ankaŭ laŭ

misuzo de la nomo „Esperanto“ kaj la malhonesto agado de Esperantidoj. La pollandaj samideanoj ni petas esti singardaj je la ricevo de propagandiloj pri „simpligita lingvo Esperanto“; ĉar en novembra n-o de „Esperantida“ gazeto s-ano Zgorzewski skribas: „Mi devas vu informi, ke mi jam komencis la pralaboron por la Esp-ida propagando, nome mi prilaboras en pola lingvo skribalvoku al polan samideanojn koncerne la nova kaj vere komprenebla Esperanto-dialektu.“

Pollandaj samideanoj, kiuj ricevis tiuspecajn propagandilojn, bonvolu ilin tuj transsendi al ni, por ke ni povu entrepreni pluajn ŝojojn.

Pola Esperanto Servo

Bydgoszcz, Polujo, Kordeckiego 1 a.
Edm. Fethke, sekr. Prengel, gvid.

Gazetaro.

Twentsch Dagblad Tubantia, Enschede, Nederl., 21. jan. (Recenzo pri ET n-o 66; noto pri eltrovinto Schoop.)

Provinciale Overijsselsche en Zwolsche Courant, Zwolle, Nederl., 19. jan. (Raportas laŭ ET pri vizito ĉe la eltrovinto Schoop.)

Twentsch Zondagsblad, Almelo, Nederl., 18. jan. (Artikolo pri la eltrovinto Schoop.)

Onafhankelyk Weekblad, Almelo, Nederl., 21. jan. (Artikolo pri s-ano Schoop.)

Nieuwe Hengelosche Courant, Hengelo, Nederl., 14. jan. (Detala priskribo de la festoj okazintaj en Brazilio, laŭ informoj per Esperanto.)

Le Petit Méridional, Béziers, Franc., 13. jan. (Artikolo pri la Esp. mondobiklistoj Seubring kaj Stoeltje.)

L'Index des Industries du Cuir, Paris, jan. (Kun bone redaktita Esp. rubriko.)

Metzer-Freies Journal, Metz, Franc., 23. jan. (Artikolo pri s-ano Zapater el ET n-o 64.)

Le Messin, Metz, 20. jan. (Artikolo pri s-ano Schoop kaj Esperanto.)

La Jeune Académie, Villeneuve-St. Georges, Franc., jan. (Recenzo pri Esp. broŝuro.)

La Dépêche, Toulouse, Franc., 6. dec. (Artikolo.)

Bulteno de la franca komerca ĉambro en Svedujo, jan. (Esp.-kroniko)

Diamantbewerker, Antwerpen, 14. jan. (Artikolo pri festo de Antverpena Grupo de Esp. Diamantistoj.)

Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, 15. jan. (Artikolo pri kaj en Esperanto de la redaktoro mem.)

Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol., 18. jan. (Kun Esp. angulo.)

Eugenia, Barcelona, jan. (Esp. kurso.)

Parolejo.

110. La financa rezultato de niaj tutmondaj kongresoj.

En la novembro-numero de la Pariza „Sennacieca Revuo“, paĝo 16, troviĝas resumo pri en- kaj elpezoj de la neokazinta X-a. Oni skribas: Le „Monde Espérantiste“ diris pri tio, ke la aranĝintoj de tiu kongreso estas ŝtelistoj. (??)

En n-o 67 de ET ni legis, ke en Praha reala ĝojiga profito de ĉ. 100000 kĉ. Tre multaj certe ne komprenas la dividon de ĉi tiu sumo. Paris denove ricevas la ĉefparton kaj UEA — nia plej grava entrepreno — neniom!

Cu ankaŭ en Esperantujo regas la sama tera maljusteco? Cu la tutmonda Esperantistaro ne rajtas postuli, ke tiel aferoj estu ĉiam publike priluktataj en la fermaj kunsidoj de niaj kongresoj? (Amort, Danzig.)

111. Rezolucio pri sveda karavano al Praha.

(Rilatas al 108)

La Nederlanda Societo Esperantista „La Estonto Estas Nia“, kunveninta en Utrecht la 8. jan. 1922, leginte la protest-artikolon de s-ano labrucker en „Esperanto Triumfonta“ de 1. jan. 1922, forte subtenas la proteston kontraŭ la malaprobinda metodo de la avedoj.

(Por L. E. E. N.: C. G. Sterkenburg, 2-a sekr.)

Varbu abonantojn al ET!

litografita vidpunkto ĝi estas senripoĉa kaj plaĉa; multaj ilustraĵoj ornamas la libron, samtempe faciligante la komprenon. Do mi povas doni al la libro mian plenan laŭdon kaj rekomendon. (O. L.)

GAZETOJ.

Franca Esperantisto. Nov.-dec.
Per ĉi tiu ni korektas nian noton en ET n-o 68, laŭ kiu „Franca Esperantisto“ ne plu aperas. Nur la Centra Librejo, ĝia ĝianuna eldoninto, ne plu eldonas ĝin, sed grupo de Esperantistoj decidis daŭrigi ĝian publikigon. La adreso restas neŝanĝita: 51, rue de Cligny, Paris 9. Tamen ni ne komprenas, kial nun aperos speciala „Bulletin“; ĉar, se jam la eldonado de „F. E.“ rezultigis malprofiton, la eldonado de du organoj de S. F. p. p. E. ankoraŭ pligrandigos la malprofiton.

Esperanto. Jan.
En ĉefartikolo „Grava Jaro“ tre pravaj konsideroj de d-ro Privat. — Originalaj artikoloj pri Filozofio. — Literaturo, ktp.

Sennacieca Revuo. Dec.
Adreso: 177, rue de Bagnolet, Paris.

Kataluna Esperantisto. Jan.
Adreso: Carme 30, Barcelona.

La Marto. Jan.
L'Esperanto. Dec.



Kie estas la virgolino?

Vintre.

De Zemaite.

En lito, ĉe muro, sidis tri infanoj, vestitaj per malbonaj vestaĵoj. Iliaj kapharoj estis pufiĝintaj, la manetoj kaj nazoj ruĝiĝintaj pro malvarmo. En lulilo flarbruis kvara infano, kiu estis plej malgranda. Sur la rando de la lito sidis virino, vestita per flanela ĵupo kaj flikita, mallonga pelto; ŝia kapo estis kovrita per kaptuko, el sub kiu pendis harligoj, sur la dorso malsurpreniĝintaj, dikaj kiel du ŝnuroj kunvolvitaj. Per tiuj ĉi harligoj amuziĝadis la infanoj, sidante en la lito. La virino estis eniginta siajn nudajn piedojn en disŝiritajn feltajn botojn, per unu mano ŝi apogis sian kapon sur la rando de la lito, per la dua — ŝi balancis la lulilon.

Ŝi estis la patrino de la kvar etuloj.

Ne povante dormigi la infanon, ŝi prenis lin sur la manojn, ree balancis, dorlotis, kisais, karesis kaj neniel povis lin trankviligi. Fine la knabeto ĉesis plori; paliginte, bluiĝinte, li malfacile spiris, kuŝante ĉe la patrino antaŭtuko. Kliniĝinte, ŝi longe rigardis la malsanan infanon kaj ree kisais, kaj ŝiaj larmoj kiel du faboj falls sur la vizaĝon de la etulo.

„Panjo, bruligu la fajron! Estas tro malvarme.“

„Jen, mi tuj bruligos. Ke nur Vinĉjo ekdormu!“

„Mi balancos Vinĉjon!“

Tion dirante, levigis en la lito plej aĝa knabino.

La patrino volve kovris la infanon en la lulilo, ĉirkaŭis la knabinon per la tuko, metis la ĉifonajon sur la plankon apud la lito kaj ordonis al la knabino sur ĝin piedstari, ĉar — la piedoj estis nudaj, kaj la planko — malvarma.

Karesante la knabineton, ŝi diris: „Balancu, mia ĉarmulino! Eble ekdormos mia etulo

Mi kuros por preni hejtajon.“

„Panjo, panjo, ne iru en la arbaron! Ni timas resti solaj,“ kriis preskaŭ unuvoĉe la infanoj.

„Mi ne iros. Ne, ne ploru! Mi trovos hejtajon tie ĉi kaj tuj ekbruligos la fajron.“

La patrino zorgeme ekbruligis la fajron, sidigis la infanojn ĉe la varmo, prenis la sitelon, forbatas de ĝi la glacilon kaj eliris. Ĝis kiam ŝi atingis la akvon en la puto, ĝis kiam revenis — pasis longa tempo.

Reveninte ŝi trovis sian etulon krianta kaj lian vartistinon ploranta. Ŝi jetmetis la sitelon da akvo ĉe la sorlo kaj mem sin jetis al la infanoj. La etulon ŝi dorlotis, karesis kaj la plej aĝan knabinon admonis, ordonis subteni la fajron kaj sin varmigi. Trankviliginte la etulon, ŝi denove balancis la lulilon.

El litova lingvo tradukis

A. Klimas.

* * *

Zemaite (elparolu: Jemaite) estas unu el la plej famaj nuntempaj litovaj verkistinoj, kiu antaŭ nelonge mortis (la 7. dec. 1921), havante 76 jarojn. Zemaite estas pseŭdonimo de s-ino Julija Zymantiene. Ŝian literaturan verkadon ŝi komencis nur de la jaro 1894, kiam ŝi havis 51 jarojn. Tamen ŝiaj beletristikaj verkoj estas sufiĉe multenombraj kaj laŭ sia formo kaj enhavo prezentas grandvaloran riĉaĵon por la litova literaturo.

A. Klimas.

Nekrologo.

Friŝ Homer,

delegito de UEA, prezidanto de la Esp. Unuiĝo por Karintio, mortis la 7. jan. 38-jara en Villach post mallonga malsano. Lia fideleco al la Esp. movado estis ekzempla kaj tro frue li mortis por ni.

(F. W.)

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu esperantisto. Presita sur luksa papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografajoj. (Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 15 germ. mk. kaj sendkostoj. Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

ESPERANTIO

tute internacia, bele ilustrita monata revuo por socia vivo, literaturo, arto, sporto, humoro, filatelio, kip.

Jara abono: Ameriko, Japanio, Ĥinio 1 dol., Anglio 5 ŝil., Svisio 5 fk., Svedio 5 kr., Norvegio 6 kr., Francio kaj Belgio 10 fk., Italio 12 lir., Ĥlando 2 50 guld., Finnlando 20 mk., Ĉeĥoslovakio 25 kr., Balkano kaj Baltiko 60 germ. mk., Rusio 30 germ. mk., Aŭstrio 1000 kr., Polio 1200 p. mk., Hungario 150 kr., Germanio 50 mk.

Ĉion sendu al P. Hitrow, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germanio.

Ni bezonas energiajn reprezentantojn.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40 paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nu. a. la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj. Specimena n-ro: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Herault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Klam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonprezo 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto. Oni invitas artikolojn nepagotajn Bonvolu enmeti kuponon, se neceso respondo.

Redaktoro, 4 Princeton St., London W. C. 1.

Anoncetoj.

DANKO. S-o Liudas Aiseika, Dotnava, Litovio, korege dankas sian korespondanton pro ricevita kristnaskaĵo kaj novaĵaraj gratuloj kaj petas pardonon pro sia prokrasto kun respondo, ĉar li nuntempe estas tregege okupata. Laŭeble ĉi ricevos respondon.

JUNULINO, parolanta la Esperantan, francan aŭ anglan lingvon kaj kiu estas akceptata en la familia rondo (tri personoj) estas serĉata por ĉiuj laboroj; ŝi ricevos bonagan salajron. Ofertin bonvolu adresi al s-o P. Malabenden, Hagen i. W., Germ., Alexanderstr. 38.

SIGELMARKOJN Esperantaj eldonadas kaj liveras (ankaŭ kaŭĉukajn stamplinojn por Esp. societoj) s-o Jozefo Kocourek, gravuristo en Wien X Aŭstr., Arthaberplatz 5-14. — Postulu specimenojn de Esp. sigelmarkoj kontraŭ 2 resp.-kuponoj. Oni korespondas ĉe, germane, ruse kaj Esperante.

AL RUSLANDO! Karaj rusaj samideanoj! Vi estas petataj komuniki al la Mogileva Esp. Komitato (u. Mogilev. Klubo Esperanto, domo de Klerigado, Dvorlanskaja), ke la eks-sekretario de Mogileva Esp. Komitato J. Draiver nun loĝas en Varsovio, Muranovska 26/32 kaj salutas siajn lamajn kunlaborantojn.

REDAKCIOJ DE ESPERANTAĴ GAZETOJ. Verkistoj de Esp. libroj kaj propagandiloj estas petataj sendi sian publikajn artikolojn al redakcio de „Esperantisky Zoravodal“, Praha II, — 2032. Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa poresperanta informilo), kiu rekomendos ilin al sia legataro. Laŭplace interŝanĝo de la gazeto! Sen paga publikiĝo de adreso!

PETO. Malriĉa samideano petas insiste monhavantajn bonfarulojn ebligti al li la vizitadon de la XIV-a kongreso per subtenoj por la vojaĝkostoj. Tielcelajn donacojn oni bonvolu sendi al Ferd. Peter Huber, Salzburg, Mönchsberg 5, Aŭstrio, kiu blankos ĉion ricevitajn aŭ en gazetoj aŭ dum la kongreso. Sinceran dankon jam antaŭe.

ANTVERPENO (Belgijo). — **PENSIONO POR JUNULOJ.** — Profesoro de Stata Mezigrada Instruado akceptas junulojn 10-18-jarajn, kiuj deziras studi ĉe Mezigrada lernejo, Athenée (Liceo), aŭ Supera Komerca Instituto. Vasta moderna domo kun elektra lumo kaj banejo. Familia vivo. Regula kontrolado pri la studado. Moderaj prezoj. — E. Vincent, Cuperussstrato 17, Antwerpen.

ATENTU! Estimataj redaktoroj kaj eldonistoj en ĉiuj landoj! Mi ne intencas vin ekspluati. La alvokoj estas

La proksima Internacia Specimena Foiro de Barcelona okazos de 15.—25. Marto 1922.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto Štlenčka, Hradec Králové, Otto Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12 2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15 II 2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga. 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g.ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberholman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City



Babcock-Wilcox Akvotubo-Kaldronoj

por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

FRATOJ STORK & K-io HENGELO (O) NEDERLANDO

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.

Esperanto korespondanta. Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.



Art-Amikoj,

Artaĵo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvaretoj, oleopentraĵoj kip, de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5. Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn kip el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj. Prokuras komercajn adresojn. Prizorgas la anoncadon en Nederlando. Interŝanĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj. Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Korespondantoj, atentu!

Mi povas al vi liveri por via interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 40 gmk. ĉiu plia linio da teksto 2 mk. pli; sendkostoj 6 mk. 100 poŝtkartoj kun via portreto aŭ ia bildo (grupejo) 70 mk.; sendkostoj 9 mk.

50 glumarkoj kun via bildo 30 mk.; sendkostoj 4 mk. 100 glumarkoj kun via bildo 40 mk.; sendkostoj 4 mk. Postulu specimenojn! Skribu la pretekston klare, eble duoble. Via fotografajo estos resendata sendefekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita presajo.


Dankon pro la liveritaj vizitkartoj; ili estas bonaj, belaj, malmultekostaj. — Teo Jung.
La belaj kartoj tute kontentiga min. Estu certigita, ke mi ne preterlasos rekomendi vin. — M. Butin.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

Komercdomoj, Komercistoj, Reprezentantoj uzu en via propra intereso la servojn de la Komercista Esperanto Grupo Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14 kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj. Perado senkoste!

Lustroj el Kristal-vitro

en ĉiuj stiloj kaj grandaj, elektra aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.



Ernst L. Hettichnach.

Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60. Eksperto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 900 000 000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvárad, Pecs, Pozsony, Satoraljaújhely, Szabadka, Temesvár.

Prizorgas ankaŭ ĉiujn banknegocojn por Slovakio kaj Transilvanio per siaj tieaj filioj. Per ĝiaj entreprenoj eksporto kaj importo de diversaj artikoloj!

Grandkomercejo de Bildokadroj Otto Knittel & Cie., Freiburg i. Br. (Germanio) Wenzingerstr. 42.



Plej bona aĉetejo por orumitaj kaj poluritaj bildokadroj. Eksperto ĉiulanden. — Oni petu specimenojn kaj prezojn. Reprezentantoj serĉataj.

oftaj: sed atentu la mian! Bonvolu sendi al mi po unu ekzempl. de ĉiuj Esp. gazetoj, libroj kip. por la migranta ekspozicio en Estonio. Insiste mi petas malalligi la prezojn de la sendaĵoj el la valutataj landoj. Rekompence vi ricevos ekzemplerojn de „Esperanto“, „Esp. Triumfonta“, „Esp. Finnlando“ aŭ aliajn gazetojn, aŭ monon. Sendu katalogojn! Referencoj: Konto ĉe UEA, „Esp. Triumfonta“ kaj „Esp. Finnlando“. — Adreso: Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, p. k. 15.

POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Swiat Pracy“, organon de Asocio de Laboristoj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevebla ĉe Ksiegarnia Robotnicza, Warszawa, Waplna 17.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Viktoro Dudveiler, Hungario, Budapest VIII, Kőrös u. 8, alto 1, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Paŭlo Schiffer, Hungario, Budapest VII, Rozsa u. 27-3-8, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

Franciskó Schlotthauer, Hungario, Budapest VIII, Hunyadi u. 38, f. 11, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiuj landoj.

Kolomano Balaza, Hungario, Budapest VIII Hunyadi u. 40, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

Stefano Kasza, Hungario, Kispesti II, Szent Laszlo utca 7, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Georgo Pomjan, Hungario, Budapest IX, Dandor utca 24, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj.

S-o Raphael Fernandez, Tarrasa, Hispanio, str. Fuente-Vieja 79, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj; pro troa okupateco estas ofte devigata atendigi skribintojn. Li petas pardonon kaj sciigas, ke li tamen ne repondos al ĉi.

S-o Kazimierz Domoslawski, kunlaboranto de soc. gazetoj, Warszawa I, poste restante, serĉas ĉiulandajn seriozajn korespondantojn pri laborista, socialista movado kaj ĝenerale pri politika vivo en ĉiuj landoj. Interŝanĝe sendos samajn informojn el Polio.

Jonui Mikaliniui, Kurŝenu g.ve 13, Šiauliai, Litovio deziras korespondi per poŝtkartoj kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

F-lo D-ro M. L. Câmpian, advokato, strato Motilor 4, Cluj, Rumanio, deziras korespondi pretere kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj, precipe Finnlando; ĉeestas la XIV-an. (Leteroj, poŝtkartoj ilustr., bildflanke).

F-ino Ilonka Stangel, oficistino, Strada Motilor 135, Cluj, Rumanio, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. (bildflanke) kun ĉiuj landoj, precipe Finnlando.

Caŭŝani-Noi (jud Tighina, Besarabio, Rumanio). — S-o Leib Contarij deziras korespondi kun fotografistoj el ĉiuj landoj kaj pri ĉio kun Azio.

F-ino E. Plińskedziute, Šiauliai, Mazojl Posadna 4, Litovio, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papieronon.

Soldato H Baumgartner, 6 Schwadron, Riedenburg, Salzburg, Aŭstrio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bildflanke) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Walter L. F. v. d. Have, Krabbenbosweg 155, Hengelo (O), Nederlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo, precipe kun fraŭlinoj; interŝanĝas ankaŭ gazetojn, Esperantaĵojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Jozefo Štulman, Sieradz, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj (bildfl.) ilustritaj kaj leteroj, ankaŭ interŝanĝi. Korespondas volonte Esperante, angle, germane.

Nikolao Ssacharov, Petrograd, Rus., Spasskij pereulok 9, loĝ. 77, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj kaj poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Jose Ventura, 12, Roter, Valencia, Hispanio, gvidanto de kurso Universitata, deziras ricevi po unu ĉiusepa Esperantaĵo kaj korespondetojn por siaj ĝelernantoj. Li dankos poŝtkarte.

S-o Tiberiu Morariu, klubsekretario, Cluj, Rumanio, Calea Traian 40, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĝelernantoj. Interŝanĝas Esp. g. zetojn, japanajn desegnaĵojn, bildolibretojn, pentraĵetojn. Rekompencas laŭdeziro ankaŭ per poŝtmarkoj.

S-o Arkadio Kostanov, Astrachani, Katoliĉeskaja 5, Rusio, deziras korespondi pri ĉia temo; interŝanĝas Esp. gazetojn, ĵurnalojn, poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn kaj naciajn gazetojn.

Rudolf Ploj, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, Pragerstr. 16, interŝanĝas poŝtmarkojn de Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio (malnovaj aŭstriaĵ kaj respublikaj) laŭ katalogo de Michl 1921/22 kun la tuta mondo.

Fraŭlo Aleksandro Ivanov, Tallinn, Estonio, S. Pärnum 38, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), poŝtmarkojn, monerojn kun ĉiuj la doj.

F-lo R. Reim, Tallinn, S. Pärnum 102, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. vidaĵoj (bfl.) kun ĉiulandaj gesamideanoj.

S-o Frans A. Qvist, Nordingrå, Sved., deziras korespondi kun samideanoj kaj -inoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj, leteroj kip. Mi tre volonte peras komercaĵojn.

Ervino Toth, Karanšebes, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Li deziras korespondi per leteroj Esperante kaj tre volonte hungare pri ĉiu temo, pretere pri literaturo (ankaŭ kun fraŭlinoj).

S-o Helmut Klemmer, teknikisto, Glastütte Sa., Germ., deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

La lernantoj el la Esp. kurso en Bilbao, Hisp., deziras havi korespondadon kun gesamideanoj (precipe inoj) de la sekvantaj landoj: Ĥina, Afgana, Beluĉistana, Turkestana, Persa, Indonĉina, Bornea (ins. Korea, Oceanaj Insuloj, Egipta kaj tuta Afriko, precipe Centra kaj Suda; en Eŭropa nur Islando, Irlando, Norvega, Greka kaj Dana landoj, en Ameriko nur Kanada kaj Usono landoj. Adreso: Pedro Bilbao, San Francisco 9-1, Grupo Esperantista, Bilbao, Hisp.

Kelkaj samideanoj el Bilbao, Hisp., deziras havi korespondadon kun Azio, Oceanio, Afriko kaj en Ameriko nur Kanada kaj Usono. Adreso: Pedro Bilbao, str. San Francisco 9-1, Bilbao, Hisp.

S-o Francisko Kuttenger deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandaj gesamideanoj. Budapest VII, Istvan ut. 44, fildoz. 4.

S-ino Katerino Keithly deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĝeeksterlandanoj. Budapest IX, Sorokaari ut. 38/6.

Budapest. S-o Vilmos Szilgeli, V., Nador u. 17-III, Hung., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Norbert Feitke, Bydgoszcz, Pol., Torunska 17, deziras korespondi letere kun perfektuloj pri ĉiuj ajn temo.

Boris Favorov, Rusio, Peterhof, Peterhovskaja 11, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĝesperantistoj el ĉiuj landoj.

Fritj Keitke, Magdeburg, Faberstr. 12, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Kiu sendos al mi 100-200 poŝtmarkojn (escepte ĉeĥoslovakajn), ricevos de mi rek. mpenca duoblan kvanton da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Remers, Düsseldorf, Germ., Luiseustr. 97.

S-o Adelberto Geiger, Stuttgart-Gablenberg, Germanio, komercisto, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kostumbildojn, papiliojn kaj fotografajojn el ĉiuj landoj.